'10 En /monto mi /estis dum
/jaroj longaj /ok kaj
/naskis sep /filojn kaj fi/linon
en la /rok."

'11 En/paŝis la /monta reĝo
/tra la doma /pord' "Pri /mi
kial pa/rolas vi per
/multmalbona /vort'."

'12 "Ne/niel mi pri /vi parolis
/per malbona /vort' sed /pri
la bono /kiun spertis /mi en
via /kort'."

'13 Kaj /batis li /ŝin sur /pala
lili/vang'* kaj /sur la belan
/ŝnuran jupon /ŝprucis la /sang'
.....

'14 "Vin /metu trans la
/pordon ra/pide, fia /hom'
ne/niam vi re/venos al /via
patrin/dom'."

'15 "A/diaŭ, kara /patro, a/diaŭ
bona /panj' a/diaŭ, kara
/frato, a/diaŭ kara /franj'

'16 A/diaŭ, ĉiel/alto, a/diaŭ,
verda /ter' nun /iras mi al
/monto, kie /loĝas monta
/reĝ'."

'17 Do /rajdis ili /trans
malhela /longa ar/bar'
Ri/detis monta /reĝo, ŝi /ploris
en a/mar'

'18 La /monton ses/foje
ĉir/kaŭis la /du Sin /pordo
mal/fermis, ili /paŝis en /tru'
.....

'19 /Ruĝan or/seĝon el/metis
la fi/lin' "Mal/ĝoja /panjo,
ri/pozu jen /vin."

'20 "Mi/elbierajn /glasojn
ve/nigu per /port' El /ili
trin/kigos mi min /mem al la
/mort'."

'21 l' u/nuan ŝi /trinkis el
/glasoj da /flor' Fer/miĝis l'
o/kuloj, kaj /krevis la /kor'
)

& Foje en konfuza horo:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 568 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (1911) kun moto "Ekzistas ja fonto, se oni trinkas el ĝia akvo, ĉiu estintaĵo malaperas el la memoro. Kiu al mi montrus la vojon al la fonto? (El "Akvo de forgeso" de Rd. Baumbach-M. Hankel.)". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Recepto por fari bonajn versaĵojn.>

(#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi do; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi do;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TiLa Ti doTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o))×8)+

(&Strofoj:

'1 /Se mi sciis, kie en la vasta mondo ; mi vin trovi povus, akvo de l' forgeso! ; Tuj mi al vi irus trans plej krutaj baroj, ; trans plej fremdaj landoj, trans plej ruzaj maroj, ; ankaŭ se vi estus ie en Hadeso.

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi.**)

'2 Amo plej terura koron mian premas, ; amo sen espero, amo sen sukceso, ; sen la ĉirkaŭprenoj kaj sen rekompenco, ; amo al fantom' sen korpo kaj esenco - ; Kie vi nur estas akvo de l' forgeso?

.....

'3 Se virin' ĝi estus kun la roz' sur vango ; kaj kun sango en la vejnoj cirkulanta, ; ho, mi prenis ŝin al mia seka brusto ; kaj sur ŝia blanka, delogema busto ; trankviliĝus mia koro soifanta.

'4 Se patrin' ĝi estus, kies
flamajn kisojn ; mi ankoraŭ
sentas sur la buŝ' kaj vango, ;
en la tombon ŝian mi tuj volus
iri ; kaj al ŝiaj teraj restoj ĉion
diri, ; por ke ĉesu ardi mia kor'
kaj sango.

'5 Ho ve, malfeliĉa estas mia
amo - ! ; Al homaro, al
fantomo nereala ; vane mi la
brakojn miajn nun etendas, ;
vane mi la kisojn al ĝi ardajn
sendas, ; vana estas mia lingvo
neŭtrala.

'6 Vane en la brusto vibras
mia koro, ; malbenita am' al
vorto sen enhavo! ; Kantojn
miajn ĝi ja tute ne komprenas,
; vane en la revoj mi ĝin
ĉirkaŭprenas, ; strangan
homan aron kun la sang' sur
glavo.

'7 Ve al homoj, kiuj en
flamemaj koroj ; portas tiun
amon vanan sen la ŝanco! ;
Homaj restoj putras en la
Manĝurio, ; sang' ankoraŭ
fluas sur la Kalvario ; kaj la
flam' ne ĉesis fumi en
Konstanco.

'8 Se mi scius, kie en la vasta
mondo ; mi vin trovi povus,
akvo de l' forgeso! ; Tuj al vi
mi irustrans plej krutaj baroj, ;
trans plej fremdaj landoj, trans
plej ruzaj maroj, ; ankaŭ se vi
estus ie en Hadeso.)

& Nigra tago:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 574 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (

/(La Lado doLa So SolTi TiLa; La Lado doLa SoTi LaLa;)×

(#Rekantaĵe: do doTi TiSo MiMi LaLa; do doTi TiSo MiMi La; do doTi TiSo MiMi LaLa; do doTi TiSo MiMi La a)

)×14)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Okazi povas, ke ke2lkfoje ;
– Kvazaŭ vi portus sarkofagon
; – Vi rampas tra la viv'
se2nĝoje ; Kaj fakte havas
"nigran tagon".

(×:; **Pikas abelo se vi ridas ;
Pikas abelo, ho, dolor' ;
Dolĉas mielo sed vi sidas ;
Dolĉa mielo estas for.)**

,& Dua:

'2 Ĝi komenciĝis jam matene ;
Kun peĉ-aŭgura malfavor' ;
Ĉar via vekhorloĝ' kretene ;
Ne bruis je la ĝusta hor',

'3 Kaj tial sekvis ordinare, ;
Ke dm rapida raz-klopod' ; Vi
vundis vin, – kaj temp-
malŝpare ; Nun lavi devis vin
per jod'..

'4 Jen la kolum-buton' obstine
; Incitis vin pro stulta spit', ;
Ĝis kiam ĝin vi fine.. fine.. ;
Retrovis ie sub la lit'!

'5 Vi trinkos iom nun da kafo,
; Sed- kuirita en infer' – ; Ĝi
estis brula kiel lafo ; Kaj vi
forkuris en koler';

'6 Por tradi tramon ĉe l' stacio
; Vi havis premon de ciklon', ;
Sed al hundaĉ' ne plaĉis tio, ;
Ĝi kaptis vin je l' poantalon',
.....

'7 Kaj ĝiaj dentoj la detruon ;
Pli "funde" faris ol skalpel': ;
Sur la postaĵo larĝan truon ;
Vi honte maskis per ĉapel'!

.....

'8 En l' oficejon tre malfrue ;
Vi venis je la deka hor', ; Dum
la kolegoj pli ol brue ;
Akceptis vin per moka ĥor';

.....

'9 La ĉefo ankaŭ ne gratulis ;
Vin, malgraŭ lertaŝajn-
ekskuz', ; Kaj grumblopreta vi
makulis ; La kontolibrojn pro
konfuz'.. ..

'10 Post taglabor' vi volis spiri
; En paca hejmo sen ĉagren', ;
Sed vanis tion ĉi esperi, ; Ĉar
vin atendis nova pen':

'11 L' edzin' kriaĉis kun la
bubo, ; Kaj bruligita estis riz'!
; Vi kuris for, – sed en la
klubo ; Kasisto petis pri l'
kotiz'!

'12 Vi tiam en gazetoj provis ;
La ĝojon trovi de l' vesper', ;
Sed en gazetoj, ve!.. vi trovis ;
Nur artikolojn pri Scherer.. ..

'13 Vi hemeniris – (por
protesti) – ; Pli frue do ol laŭ
kutim' ; Kaj vidis tial.. sin
revesti ; L' edzin-amikon en
intim'!

'14 Vi ĝemis nun, ĉar ĉi
eksceso ; Transpasis forton kaj
imagon, ; Kaj nete restis la
impreso, ; Ke vi travivis..
"nigran tagon".

& Sibilla orakolas:

< Rekante 27 el 41 batoj por strofo, entute 574 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931) kun enkonduko: (Tiuepoke mi scivolis, kion la jaro 1930 estis alportonta.). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de feroa "Brúsajøkils kvæði" sed iom longigita kaj rekantaĵo el la alitaktaj partoj de la poemo. Klarigo (*) de R. S.: '12 Supozeble G. N. K. K. sinifas: Gratulaj Notoj de l' Konstanta Kritiko.>

(#Melodio:

<:41> (

/do TiLa LaLa SooFaFa LaLa LaSo LaLa; do TiLa LaLa
SooFaFa dodo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaLa LaLa; SoFa FaFa; SoLa La;La SoLa La a;
LaLa LaSo; FaSo LaLa; LaLa LaSo FaSo La a; LaLa LaLa; dore
redo; dodo dodo TiLa La a)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /Ŝi loĝas en ĉambreto de
subtegment-etaĝo, ; Ŝi estas
sorĉistino kaj putto de
mondsaĝo;

(×:; **Orakolo, ; Karambolo, ;
Hum-kaj-bug' ; De l'
centrifug'! ; Rajdoside ;
Surakride ; Super val',
river' kaj mont' ; Nun
senbride ; Akravide ; Saltu,
saltu al Estont'!**)

'2 Por ŝi l' Estonta Tempo ne
kaŝas plu sekreton ; Kaj antaŭ
ol mi diris, ŝi konis mian
peton.

'3 "Vi volas scii, kion la
alvenanta jaro ; Alportas
interesan por l' Esperantistaro?
.....

'4 Pri tio tuj mi donos klarigon
kaj informon, ; Sed mi antaŭe
falu en plej profundan
dormon."

'5 Ŝi tiam prenis libron (ĉar libron ŝi posedis), ; Eklegis dek liniojn kaj lace jam oscedis,

'6 Ŝi dormis.. kaj ekdormis eĉ dika araneo ; Falinta sur la libron: la "Idoj de Morfeo"..

'7 "Mi vidas... vidas urbon... Kolonjon ĉe rivero ; Prepari la kongreson kun ĝojo kaj espero,

'8 La Rejno ŝaŭme saltas ĝis super sia bordo, ; Kaj tamen la kongreso... okazos en Oksfordo!

'9 Mi vidas nun tri virojn, – aŭ eble estas kvaroj – ; Jungitajn – (sed sen Teo) – al ĉaro de l' Vortaro;

'10 Venkitaj de la SAT'o jen ili tiras, puŝas... ; Ho sankta Kabe, helpu! – Ĉi tiuj kvar akuŝas!

'11 Mi vidas nun ezokon kun grasiĝanta koro... ; Ĉu tio parabolus pri C. K. kaj pri K. R.?

'12 Jes, sane pumpas K. R. kaj pompe sanus C. K., ; Se ĝin ne juke ĝenus kelkfoje G. N. K. K.*

'13 Mi vidas... dek mil homoj samkiel al spektaklo ; Sin puŝas en lernejon avidaj pri l' miraklo,

'14 Entuziasmo kreskas, triumfa ĝojo bruas, ; Ĉi tie – tute simple – sinjoro Ĉe instruas...; **Orakolo, ; Karambolo, ; Hum-kaj-bug' ; De l' centrifug'!** ; **Rajdoside ; Surakride ; Super val', river' kaj mont' ; Nun senbride ; Viv-avide ; Ni revenu al la Mond!'')**

& La kampulo kaj la korniko:

< Maĵora rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 576 paŝoj dum 7 minutoj. Minora rekante ripete 11 sed rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 342 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4448. Satiro pri la jam delonge altaj impostoj, kiujn en fruaj epokoj kolektis reĝaj inspektistoj ("feŭdoj"). Du diversaj melodioj kaj rekantaĵoj sed cetere sama teksto. El sveda tradukis Kukoletto (1993 --oRE). Klarigoj (*): '1,9 Kva = kiu. '17 Als = tiel, ke ĝi poste estas.> >

(#Melodioj:

((#Maĵora: <2,5:4> /Do MiSo Do MiSo /Mi So do o; /La Fa La do /SoSo SoFa Mi i;So /Fa FaLa Re ReFa /Mi So Do o;/Re Re Fa TI /ReDo DoDo Do o;)

?

(#Minora: <1,4:> ;/LaLaLa LaLaLa /miimi mi; /faaso faami /reldore mii;mi /doremi doremi /reeTi doodo; /TiiSo La /Laami milredo /TiiSo La a;)

)×18)+

(&Strofoj:

'1

(&Maĵora:

/Iris kampulo en /pinarbar'

(×:; /hejom fejom /fale rale
ra ;)

li /vidis kornikon kan/tantan
klare

(×:; /hejom fejom /fale rale
ra.))

?

(&Minora:

/Iris kampulo (': en /pinarbar')

(×:; /falu lej,)

(': en /pi2narbar' ;)

li /vidis kornikon kva* /kantis
klare

(×:; /Falu lej, /fale lu2le
/lulan lej/.)

'2 Ektimis kampul' kaj rekuris
al bien' "Aj, panjo, min
mordos korniko jen!"

'3 Ŝpinis l' ulino ĉe sia ŝpinrad'
..... "Ĉu homon atakus kornik'
per mordad'?"

'4 Streĉis pafarkon kampul'
per genu' li pafis kornikon
en altsitu'

'6 Venis mesaĝo de l'
inspektist' "Vi pafis
kornikon el kia konsist'?"

'7 "Kornik' en la dom' estas
pro mia streb' da kandel'
dek du funtojn mi faris el seb'
.....

'8 El plumoj por ĉiu lito
kusen' eĉ por servistaro
sufiĉis la ben'

'9 Ventumilojn el flugilpluma
afer' kvajn* uzos knabinoj
dum bela veter'

'10 El beko preĝejan turpinton
por fest' ni faris
preĝejturan kokon el krest'

'11 Knedujon ni faris el ĝia
krani' ne estis pli granda
dum homhistori'

'12 La kolo korniĝis por sona
blov' ĝi sonis pli forte ol
grandulbov'

'13 Ŝuparojn dek du el ĝia
stomak' restaĵon ni faris
als granda sak'

'14 Intestoj fariĝis dekducola
ŝnur' forkego por sterko el
ĉiu krur'

'15 La viando metiĝis en
tinojn kun sal' krom steko
acida, por paĉjo regal'

'16 Ni faris velŝipon el ĝia
ripar' plej grandan velintan
sur nia mar'

'17 Postaĵon mi faris als*
kudrista ring' korniko por
ni estis bona ating'."

'18 Do kantu la kanton ajnulo
laŭ plaĉ' nenion forprenu
pro l' impostaĉ')

& Eŭropo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 7 minutoj. Poemon verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid per disduigi strofojn kaj versojn kaj doni melodion kaj rekantaĵon de Bresta balado, Norda Kantaro #4408.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/dolTi re3do doTi TiiTi;Ti La3La LaMi LaaLa;La LaTi doTi Ti Ti3;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×20)+

(&Strofoj:

'1 /E2l nekonataj, ŝlimaj ;
abismoj de l' animo ; Mi aŭdas
strangan bruon, ; en
malgraŭvola timo,

(×.; Paŝu gajan la dancon ;
Brilas aŭroro bele taga ;
Venu en alta somertemp'!)

'2 Ĝin trapenetas krioj, ;
kaŝitaj dum miljaroj, ;
Grincado de la dentoj, ;
metalo de fanfaroj,

'3 En ĝi stertoras veoj, ;
lamentas ploristinoj, ;
Tamburas ŝmacajn hakojn ;
falintaj gilotinoj,

'4 Susuron flirtas flustre ;
truita silk' standarda ; Kaj ĉion
fonas kraka, ; reeĥa boj'
bombarda... ..

'5 Analojn, postlasitajn ; de
gentoj kaj prauloj, ; Mi sentas
en angoro ; tra tempoj kaj
nebuloj,

'6 Antikvaj krimoj pete ; al mi
etendas manojn ; Kaj
forĝesitaj lingvoj ; malbenas
la tiranojn,

'7 Haladzon spiras bruta, ;
mensoga kaj maldanka ; La
tuta historio ; de mia raso
blanka,

'8 Nur kelkaj epizodoj, ; nur kelkaj bravaj voĉoj ; Surlumas tiun muĝon ; de l' murdaj sangdiboĉoj,

'9 En ili ĝermas savo, ; en ili – la lumturoj, ; Pro ili solaj palas ; vizio de l' teruroj,

'10 Nur sur iliaj ŝultroj ; atlantaj de l' kelkopo ; Sekure kuŝas sorto ; de l' krimulin' Eŭropo.

'11 Nur pro ilia sango, ; oferoj kaj ĉagreno ; Retrovas la honoron ; la pala Magdaleno,

'12 Por naski novan idon, ; en la feliĉaj larmoj, ; Mesion liberigan ; de la katenaj armoj... ..

'13 Aŭskultu do, Azio, ; mamnutristino nia, ; Afriko sfinkse muta, ; tribar' Oceania,

'14 Ĝemela kontinento ; de l' ambaŭ Amerikoj, ; Kunfratoj de l' estonto ; kaj dumaj malamikoj.

'15 Aŭskultu kaj konfidu ; la jam proksiman horon, ; En kiu nova sango ; trafluos nian koron

'16 Ankoraŭ kelkaj limoj, ; hezitoj kaj decidoj – ; Kaj kun la mirtaj branĉoj ; pilgrimos blankaj idoj,

'17 Kuraci viajn vundojn ; kaj super la cikatroj ; Trasenti la hontigan ; brutecon de la patroj,

'18 Starigi novan mondon ; de l' paco kaj libero, ; Proklami la Laboron ; reĝino de la tero... ..

'19 Tempestas la mistikaj ; abismoj de l' animo, ; Sed jam vidiĝas lumo ; en nova malproksimo

'20 Obee donas vojon ; laciĝo kaj miopo ; Al kredo de l' estonto ; de la patrin' – Eŭropo.)

& Iras abiturient'....:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 7 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921) baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Balado de Virgar, Norda Kantaro #4406, kaj adaptoj de ritmo en strofoj '8-10 kaj '18-20.>

(#Melodio:

<1,6:29> (a;La /MiLa LaTi TiTi do;re redo doTi TiiMi;Mi LaLa TiTi TiTi do;re redo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La)

)×20)+

(&Strofoj:

'1 En splena sent', ĉagrena sent' ; Jen koron ekkaresis ; Arĝentsonor' de l' rememor' ; Pri l' tempoj, kiuj ĉesis.

(×: **Nun emas mi en danco jam iri ; dum rozoj, lilioj ; kreskadas tre.**)

'2 Ĝojriĉa temp', feliĉa temp' ; De l' knab' facilanima, ; Ho vivabund' en kora fund': ; Viv' estas ja senlima...!

'3 Senpena sort' kaj plena fort', ; Amika rondo varma, ; Kortuŝa fid', plenbuŝa rid' ; Pri ia farso ĉarma.

'4 Ho ora viv', ĝojflora viv', ; Flugiloj ĝoj-frapantaj, ; Malĝoj' kaj dub': facila nub'... ; Projektoj dolĉe vantaj,

'5 Studenta temp', ho venta temp': ; Aĝ' de l' printempa vento! ; Ag' de April': en blanka bril' ; Burgonas knabo sento.

'6 Naiva am': soifa jam ; Je kis' la lipo estas ; Kaj la admir' per fabla mir' ; La amatinon vestas.

'7 Naiva poz': do, sen ripoz', ;
Nur supren sur deklivo! ;
Infana songĝ', ho, vana songĝ', ;
Ĉar vekas zorg' de l' vivo... ..

'8 Re2portu bri2lo2n ; al la
malĝojanto ; Ma2lnova,
ka2ra2 ; kant', adiaŭkanto:

'9 Iras abiturie2nt' ; – Ja4m
for. ; Adiaŭ, ĉiu
kunstude2nt'...! ; – Ja4m
fo2r...

'10 La voj' al hejm' jen antaŭ
mi, ; Filistro estos an[kaŭ mi].
; Ja2m fo2r... ja2m for... ; Ni
ki[su nin je] lasta fo2j'.

'11 Infana songĝ', ho vana
songĝ', ; Ĉar vekas zorg' de l'
vivo. ; Kaj svenas ĝoj' kaj
venas voj' ; Malsupren sur
deklivo.

'12 En truda dev' la fluga rev',
; La songa mond' ekpalas, ;
Flugila sving' sen cel-ating' ;
Lamiĝas — kaj ni falas.

'13 Nenie sav'... Nek ama rav'
; Nin helpas por leviĝo. ; Ĉar
ĝenas nin, ke venas fin': ; Aŭ
tromp' aŭ senreviĝo.

'14 Amika rond'... Ĝin portas
ond' ; Malpura: lukt' por vivo.
; Malam', malpac', barakt' kaj
lac' ; Envio, monsoifo.

'15 Kaj post esper' la
malprosper' ; Eterna kaj rigida
; Splenigas nin, plenigas nin ;
Per saĝo tre acida:

'16 Por kio lukt': acida frukt' ;
Ja estas la espero ; Kaj ĝi de
sur ; branĉ' sen matur', ;
Defalas al la tero.

'17 Do lasu nur: viv' pasu nur,
; Ĉar estas ver' ordona, ; Ke
estas mond' kaj restas mond' ;
Malĝoja kaj malbona.

'18 Ho plo2ru2, plo2ru2 ; kun
la ekploranto ; Ma2lnova,
ka2ra2 ; kant', adiaŭkanto:

'19 Iras abiturie2nt' ; – Ja4m
for. ; Adiaŭ, ĉiu
kunstude2nt'...! ; – Ja4m
fo2r...

'20 La voj' al hejm' jen antaŭ
mi, ; Filistro estos an[kaŭ mi].
; Ja2m fo2r... ja2m for... ; Ni
ki[su nin je] lasta fo2j'.)

& Pli rev' ol vero!:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio de Roncevala batalo kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (#Runtsivalsstríðið:

/mi fami mire dooLaLa dore mimi mi; mildo dore redo dooLaLa dore mimi mi;

(#Rekantaĵe: mimire doTi LaSo La;La dore mimi mi; mido dore redo doLa do Ti La lmi)

)×20)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Sensperta nur junulo kaj preskaŭ nur infan', ; De2 l' sorto frufrapita naiva homaran'

(×: **Rajdas ili el Franca land' ; kun kara pred' en sel' ; blovu kornon Olivant' en Ronceva2l'.**)

'2 Revadis pri feliĉo, pri amo reciproka ; Dum sangis lia koro en urbo Bjalistoka. –

'3 Sufera atestanto tro frue de pogrom', ; Vekiĝis en infano jam voloforta hom',

'4 Kaj li ofere forĝis la ilon de l' kompreno ; El sia propra koro, el amo kaj ĉagreno;

'5 Kaj multvalora kerno sin kaŝis sub la ŝelo: ; "Interna la Ideo" – jen estis la juvelo!

'6 Magie ĝi ekbrilis, kun forto de mister' ; Komencis la miraklon de Paco sur la Ter'.

,& Dua:

'7 Sed ve! – forpasis jaroj... arĝenta jubileo... ; Plenvive pulsas Lingvo, sed velkas jam l' Ideo!

'8 Kaj vane fuŝpoetoj pri ĝi
banale rimas, ; Per vortoj ĝi ne
vivos , – almenaŭ mi ĝin timas
–

'9 Kaj ruzaj praktikuloj ne plu
bezonas ĝin, ; Do mortu la
Ideo laŭ plaĉo de l' destin'!

'10 Ĝi estis utopio, infana nur
afero, ; Kaj pli agrable tintas
la sono de monero.

'11 Jes, prave, ho filistro, vi
turnu tiun paĝon ; Kaj plue
kun profito disvendu do
fromaĝon!

'12 En arta skatoletto, kun
Esperanta moto, ; Ĝi tra la
mondo iros ĝis ĉe la
Hotentoto. –

,& Tria:

'13 Ĉu ne, samideano, mi
ŝparu la rimarkojn, ; Vi tamen
nur bildflanke kolektos
poŝtajn markojn,

'14 Vi tamen amindumos, sen
risko, sendanĝere, ; Kun
ĉarma fremdanino poŝtkarte
aŭ letere,

'15 Vi tamen reveturos al kiu
ajn kongres' ; Kaj ĝojos... se la
balo finiĝas kun sukces'!

'16 Vi kantos emocie kun
plore pia sento ; La himnon de
l' espero kaj de l' facila vento;
.....

'17 Konfuze vi remiksos la
Homan Familion ; Kaj pli
profitan ismon kaj eĉ
Filatelion,

'18 Kaj dum vi fanfaronos pri
daŭra Pac-spirito ; Per osta
pugno frapos rikane vin
Milito...

,& Kvara:

'19 Ĉar, ke l' esperantistoj por
paca la batal' ; Kunvenas sub
la ŝildo de Majstro-ideal',

'20 Ke nun ankoraŭ kreskas
rapide la afero, ; Jam estas,
bedaŭrinde kaj ve! – pli Rev'
ol Vero.)

& 1919:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 585 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923) kun postnoto "(Nikolsk-Ussurijsk)". Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio islanda kaj rekantaĵo kiel por Kanto de l' trompito.>

(#Melodio:

<:65> (a;La /La do La dodo La doTi La do;do Ti mimi Ti mimi Ti redo Ti i; La dodo La dodo La doTi La do;do Ti mimi Ti mimi Ti redo Ti i;

(#Rekantaĵe: mi mi fa fa fa fafa fa mi; rere rere re dodo do do Ti i; mi mi fa fa fa fafa fa mi; rere rere re dodo do Ti La a)

)×9)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Si/lente neĝas... Post nuba vualo ; sin kaŝas la luno pro sangabomen'... ; Tra la mortvoka muteco en valo ; subite eksonas soldata blasphem'...

(×:; (**Bone gvidu mian ĉevalon ; veni hejmen antaŭ la nokta fal'.**)×)

'2 La neĝo siblas sub glitveturilo... ; Por vivo petegas infana helpkri'... ; Apude sidas, en man' kun fosilo, ; la patro, sen larmoj pro mortapati'... ..

'&2:

'3 Post veturilo: - rajdantaj kozakoj, ; pafilojn tenantaj por faro de l' juĝ', ; malsataj korvoj kaj... knaras sur brakoj ; la ĉenaj katenoj en la ventomuĝ'... ..

'4 Nun haltas la veturilo... Silento... ; Kelkfoje aŭdiĝas nur flustra ordon' ; kaj duonronde la nokta taĉmento ; viciĝas por lasta funebra kordon'... ..

.

,&3:

'5 La patro fosas... Apude en
sveno ; lin spasme, sen ve',
ĉirkaŭprenas filet'... ; La
tombo, propre fosita por sceno
; de homtragedio, atendas en
pret'

'6 "Je nom' de l' leĝo!" -
soldat' kun aplombo ; nun
legas pormortan verdikton de
l' stab' . ; La vir' genuas ĉe
rando de l' tombo, ; al koro
amanta sin premas la knab'...
.....

,&4:

'7 "Mi devas morti kaj mortos
sen timo, ; eĉ palo hontiga ne
tremas sur vang' . ; En lasta
horo de mia animo ; rezigne,
sed firme profetas la lang' ,

'8 ke mia morto - la sorto
montrita ; por Vi, ho patrujo
kaj tuta mond' , ; ĉar, kredu, de
Vi mem estas fosita ; la vin
atendanta eterna tomb'!"

,&5:

'9 Mallonga preĝo... Je kri' de
l' komando... ; subite
ektondras la paf' post
moment'... ; Du sangaj korpoj
enfalas de l' rando ; kaj... ĉion
surkovras la neĝa silent'... ..)

& Infanoj de zorgo:

< Rekante 27 el 49 batoj por strofo, entute 588 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Gerder?. El ? tradukis? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:49> (

/do SoSo do re Tido rere; mi dodore fa redo TiSo; do SoSo do re Tido rere; mi dodore fa laso fami;

(#Rekantaĵe: re Tido reTi mi do; re Tido reTi mi do LaLa So; : re Tido reTi mi do; re Tido reTi mi do LaLa So Ti do o)

)×12)+

(&Strofoj:

< El Gerder.>

'1 /Finiĝis varmega jam tago, ;
Kaj nokto agrabla fariĝis, ;
Sub ombra cipreso, ĉe lago ;
Diino de Zorgo sidiĝis.

(×: **Dancu ni vigle sur la ;
Dancu ni vigle sur la firma
ter' ; Dancu ni vigle sur la ;
Dancu ni vigle sur la firma
tera grund'.**)

'2 El ruĝa argilo Diino ;
Malgaje figuron skulptadis, - ;
Kaj luno, de nokto reĝino, ;
De blua ĉiel' rigardadis.

'3 Jen Zeŭso al bela Diino ;
Parolis kun dia favoro: ;
"Rakontu, malgaja knabino, ;
Pri via doloro en koro?

'4 "Ho, Zeŭso, Diino rediras: ;
Alportu al mi vi plezuron! ;
De vi mi nur solan deziras: ;
Vivigu vi mian figuron!"

'5 - Volonte! Mi vin
kontentigos: ; Viviĝas figuro
jam via! ; Sed tamen de nun
mi devigos, ; Ke estu eterne ĝi
mia! -

'6 "Ho, ne! Al li Zorgo
parolas: ; Figuron mi longe
skulptadis, ; Al vi mi ĝin cedi
ne volas, ; Ĉar ĝin mi por mi
preparadis!

'7 Por mi ĝin restigu!" korege
; Ŝi Zeŭson potencan admonis.
; - Ho, ne! mi ĝin amas
varmege, ; Al ĝi ĉar animon
mi donis! -

'8 "Pro kio disputon vi tenas?"
; Subite la Ter' al li diras: ; Al
mi ĝi sen dub' apartenas, ; Ĉar
tera en teron foriras!"

'9 Kaj dioj disputis senfine, ;
Ĉar cedi neniu deziris ;
Figuron argilan, - sed fine ; Al
Kron' ili ĉiuj ekiris.

'10 "Ĉar unu al dua ne volis ;
Figuron vi tiun-ĉi cedi, -" ;
Grishara Saturn' ekparolis: ;
"Vi kune ĝin povas posedi."
.....

'11 "Aŭskultu-do, dioj: nur
kiam ; Ĝi moertos, anim'
apartenos ; Al Zeŭso potenca,
- kaj tiam ; Jam Ter' ĝian
korpon alprenos.

'12 Kaj vi, ho, de Zorgo Diino,
; Ĝin povas posedi ĝis morto!"
; Mi pensas, ke tia difino ;
Similas al homa la sorto?

& Brulpereo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado (Norda Kantaro, #4409 kaj #4411), redisigante la strofojn als duversaj.>

(#Melodio:

<1,6:31> (/mi mi dolre mi so somi re so;so soso soso fami re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; domi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; Somi mimi re do)
)×19)+

(&Strofoj:

'1 /Am', artfa2jraĵo milkolora! ; Am', artfajraĵo milkolora! (×:; En la ĉen' ; dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.)	'7 Pri lip-sur-lip', kaj kor-ĉe-koro. ; Ho, pluv' arĝenta, pluv' el oro,
'2 El kor' ekflagras vi subite. ; Mi ekbruligis vin. Ravite	'8 Ho, dolĉaj flamoj rozkoloraj, ; Ho, dolĉaj sentoj fajrofloraj
'3 Mi ĝojis pri fajrejoj viaj. ; Espersteletoj verdradiaj	'9 De laŭstudenta am' naiva... ; Sed ruĝo de l' sopir' soifa
'4 Brilante tra l' animo lumis ; Kaj karesante milde zumis	'10 Raketis, falis sur la koron. ; Mi sentis akran bruldoloron,
'5 Pri l' feliĉego alvenonta. ; Kaj el la koro fajrofonta	'11 Mi tamen ludis plu kuraĝe. ; Kaj nun malhele kaj sovaĝe
'6 Flagradis flamo bluehela: ; Revado pri plezur' ĉiela:	'12 Leviĝis en violkoloro ; La pezaj flamoj de l' doloro...

'13 Ektremis mi ĉe l'
ekrigardo. ; Kaj venis kun
bruliga ardo!

'14 Purpur' terura de l' pasio ;
Galopas fajro jam tra ĉio... ..

'15 Mi time miras ĝian
svingon. ; Mi krius jam, ho ve,
estingon!

'16 Brulvundoj veas sur
animo. ; Kaj kreskas jen la
brul' sen limo,

'17 Jam kri' por helpo vane
sonas. ; Stertore mi en flamoj
dronas,

'18 Sangnuboj antaŭ la
okuloj... ; Ve, mi pereas en la
bruloj

'19 (De l' artfajraĵo
milkolora.)×

& Konsiloj al malĝoja amikino:

< Rekante 23 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio el Transtrand, Svedujo, kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:31> (/LaTi dore mimi somi; fimi midi LaLa Lado;

(#Rekantaĵe: Ti So So Tilre doLa La La; <[la:do]> do do do redo TiLa SoFa So oLa; SolFa MilRe MilRe DolTi Do lDolRelMi Do Do)

)×19)+

(& Strofoj:

'1 /Lernu vin, ho kara, ŝati, ;
ĉar ne helpas sin kompati.

(×: **Jen ŝanĝiĝo2s via sorto ;
Dancu nun kun fiera rekta
dorso ; Je2n ŝa2nĝi2ĝo2s
vi4a sorto.)**

'2 Se vi estas por vi blinda, ;
mankas memestimo inda.

'3 Ĉar ja estas sed kaj tamen, ;
vi neniam diru amen!

'4 Se necesas, eĉ adultu, ; sed
neniam simple stultu.

'5 Vi ne estu ŝaf' kaj predo ;
aŭ citrona in' aŭ ledo.

'6 Estu freŝa, estu forta, ; se
necesas, eĉ senvorta.

'7 Estu, kiam ajn, kuraĝa, ; kaj
ĉe l' fin' de l' vivo saĝa.

'8 Flugu sola al la Luno, ; brilu
ene kiel suno.

'9 Lernu esti sen modesto, ;
jen la viv' fariĝas festo.

'10 Honesteco ne sufiĉas, ; se
vi tamen sklavo iĝas.

'11 Dependigu vin ne ĉiam ;
kaj se eblas, eĉ ne iam.

'12 Se vi pri vi mem nur
dubas, ; via tuta vivo rubas.
.....

'13 Kara, serĉu al vi celon, ;
serĉu veron, serĉu belon.

'14 Iĝu lerta vivartisto ; kaj
konsciu pri rezisto.

'15 Se vi lernos mem vin ami,
; jen vi scios ankaŭ dami.

'16 Al fiuloj ĵetu ganton, ; Ne
adoru plu la vanton.

'17 Vivu ne nur do por plaĉi, ;
tia vivo devas aĉi.

'18 Spitu do al la postulo ;
plaĉi volas ina nulo.

'19 Se vi ĉion el vi kreos ; kaj
ne plendos kaj ne veos,)

& Signhild Fiera:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4439. Melodio laŭ feroa danco. El dana tradukis Martin Strid (2014).>

(#Melodio:

<1,5:31> (do /dodo do rere rere soso so mi; do rere re remi fa so o; mi soso so solfa mi fafa fa mi; mire do mi re e do o; h)×19)+

(&Strofoj:

'1 /Signhild Fiera fare miksas da vin', ; – jen bele faladas la ros' – ; invitas ŝi fra²ton hejmen ĉe sin. ; En kirasojn ĉiuj.

'2 Ili donis da med', ili donis da vin',

(×:; – **jen bele faladas la ros'** – ;)

tiom longe, kiom la suno brilis.

(×:; **En kirasojn ĉiuj.**)

'3 Ŝia frato volis rajdi al hejma dom' Signhild Fiera sekvofraŭlojn proponis.

'4 "Per sekvofraŭloj kion mi? Miaj malamikoj estas nun ĉiuj en lit'."

'5 Sed kiam li venis al vilaĝa erik' renkontis li siajn sep malamikojn.

'6 Kaj kiam li venis en densa bosk' pri la malamikoj li devis agnoski.

'7 "Mi petas, miajn malamikojn, el kor', vi lasu min blovi per ora sonor'."

'8 "Vi nian permeson havu konsol', vi blovu sonoron dum via vol'."

'9 Li blovis sonoron, li blovis je fort' aŭdis Signhild Fiera en sia kort'

'10 Li blovis sonoron, li blovis je daŭr' aŭdis Signhild Fiera en lita kaŭr'

'11 Kaj Signhild Fiera vokis en bien' "Mian grizan ĉevalon elgvidu jen.

'12 Mian grizan ĉevalon
algvidu nun, dum sep jaroj
ne vidis li la sunon.

'13 Li sunon ne vidis dum sep
jaroj, dum jaroj dek kvin
ne kun selo staris.

'14 Alportu nun lancon al mi
kaj glavon, dum jaroj dek
ok ilin mi ne havis."

'15 Kaj Signhild Fiera rajdi
urĝe devis, ŝia bona ĉevalo
per tio krevis.

'16 Kaj Signhild Fiera vokis
en anksi' "Respondu min,
frato, se povas vi."

'17 "Ne estas mi ofero nek en
anksi', helpu min fratino,
se povas vi."

'18 Morthakis ŝi liajn sep
malamikojn ŝi portis lin
hejmen en viva fortik'.

'19 Kaj se ili estus du por unu,
..... ŝi donus al ili mortigan
vundon.)

& Kiel fariĝis la blanka homo?:

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 594 paŝoj dum 7 minutoj. Negran fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Balado de Greto.>

(#Melodio:

(#4413. Grettis kvæði: (<:33> /La3La LaaLaMi SiSiSi La3Ti; doodoTi do3Ti LaSo; TiTiTi Ti3Ti TiTi do3do; doodoTi do3Ti LaSo;

(#Rekantaĵe: Ti TiMi Si La; LaLalTi doTi LalSo; Ti TiTiTi Ti do; dodoTi dodoTi La;So Ti TiMi Si La a)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 /Kiam la Temp' ne havis nomon, ; komencon, fazojn, finon, ; la Dio kreis - nigran homon ; dirante la destinon:

(×:; **Nun falas frostoj ; sur la2 larĝa fjordo ; jen kuŝas kampulo ; en tero malhela morta ; Nun falas frostoj.**)

'2 "Al vi la bestojn kun ĝangaloj ; mi donas nun donace, ; eĉ riĉon de la montoj, valoj ; por vivi bone, pace.

'3 La paradizo de l' tropiko ; al negroj apartenas ; ĝis fraton frate en kunligo ; la buŝo, koro tenas".

'4 Du fratoj foje en la valo, ; kiel ebono nigraj, ; ĉasadis kune en ĝangalo ; sur vojoj spure tigras.

'5 Ĝemeloj ili, sed interne ; du malaj mondoj estis ; ĉe unu noblo en li ferme ; kun bona volo nestis;

'6 ĉe dua ruzo kaj avido ; superis ĉiun senton, ; li pagis fidon per perfido, ; neniam havis penton.

'7 Rivaloj estis la ĝemeloj, ; knabinon saman volis, ; sed ŝi dum svataj amkvereloj ; nur ridis kaj petolis:

'8 "Mi ne elektos, sed vi sciu, ;
ties edzin' mi estos, ; kiu en
ĉaso venkos, kiu ; per tigrofel'
min vestos!"

'9 Kutimo estis tiapreze ; akiri
la amŝancon; tial la fratoj
ĝangalmeze ; ĉasante tenis
lancon.

'10 L' unua brave kaj ĉasarde ;
inter lianojn paŝis; la dua ruze,
tre singarde ; post frata korp'
sin kaŝis.

'11 Subite ega tigro saltis ; sur
dorson de la dua... ; Je
helpokri' sinturne haltis ; lin
savi la unua

'12 kaj li per lanco, sed batale
; la tigrokoron trafis, ; gajninte
ŝancon eĉ lojale ; la fratan
vivon savis.

'13 Sed danko sento en animo
; de l' dua fate dormis; instige
lin al aĉa krimo ; ĵaluzo murda
ŝtormis.

'14 Dum senfeligis sian
predon ; la ŝancgajninta frato,
; la dua planis jam rimedon ;
ĝin ŝteli sen kompatato

'15 kaj postrestante tuj kruele ;
mortpikis li per lanco ; kaj
sinvestinte tigrofele ; jubilis
pro l' amŝanco.

'16 Li hejmeniri sin preparis ;
sen pento, sen riproĉo, ; kiam
mem Dio vojon baris ; kaj
tondris Lia voĉo:

'17 "Aĥ, kion faris al la frato ;
ci, aĉa kaj maldanka?!" ; Li
sen respond' kun timtremado ;
paliĝis krete blanka.

'18 "Por puni stigme perdu
signe ; la nigron de l' ebono!" ;
Dum tion diris Di' indigne, ;
fariĝis - blanka homo.)

& La stranga aventuro de Grafo Dormanski:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 595 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino".>

(#Melodio:

<:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La La a;)

)×17)+

(&Strofoj:

'1 /En Rusujo bolŝevika, ;
Dum la ŝtatrevolucio, ; Oni
aŭdis pri unika ; Fako de la
Historio.

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun
rakonton ; Sonu laŭde kun
la fonto ; Plankon paŝe,
drume draŝe ; Estu
interhoma ponto.**)

'2 Bolŝevikoj sangavidaj, ;
Filoj de blindiga ruĝo, ; Estis
tre rapiddecidaj ; Ĉe
kondamna pun-aljuĝo.

'3 Ili buĉis sen kompatato ; –
Pro Justec' revolucia – ; Ĉiun
viron en la ŝtato, ; Kiu estis
senmetia.

'4 Ili al la tribunaloj ; Ĉiutage
iun trenis, ; Kies manoj, ĉar
sen kaloj, ; Dum labor' neniam
penis.

'5 Se ĉi tiu ne sukcesis ; Esti
ruza advokato, ; Lian kazon
fin-procesis ; Senkapiga
sabrobato.

'6 Vivis tiam en kastelo ; Graf
Dormanski, parazito, ; Kies
sola vivocelo ; Ŝajnis, "kuŝi en
la lito" –

'7 Kaj ĝin sciis la urbanoj, ;
Ke li senlabora estis; Ĉu
mirige? Policanoj ; Iun tagon
linarestis!

'8 Kaj la Grafo senprudenta ;
Antaŭ Tribunalo staris, ; Dum
kozako kompetenta ; Sian
sabron jam preparis.

'9 Nia Grafo krokodile ; En
poŝtukon multe ploris, ; Sed
subite, fulmobrile ; Sava
penso lin traboris!

'10 Tuj li petis, esperplena, ;
De l' juĝeja prezidanto, ; Ke l'
procedo ekzamena ; Estu nur
en Esperanto.

'11 La juĝistoj dolĉanime ;
Cedis al ĉi tiu peto; En
mondlingvo bonesprime ;
Komenciĝis la enketo:

'12 "Graf' Dormanski, la
akuzo ; Diras, ke vi sen merito
; Vian vivon post amuzo ; Nun
pasigas en la lito; –

'13 Ĉu vi montros argumente,
; Ke ĝi estas hom-metio?" ;
Kaj li diris: "Evidente ; Tio
estas profesio!

'14 Se mi vivas en la lito, ; Tio
pruvas kun bontrafo, ; Kun
logiko kaj kun sprito, ; Ke mi
estas... litografo!"

'15 Kaj ĉi tiu ŝercdeklaro ; Tre
sukcese lin defendis, ; Ĉar
ridanta juĝistaro ; Lin gratule
hejmensendis...

'16 Sed nun sekvas Epilogo ;
Al ĉi tiu mira kanto: ; Nia
Grafo filologo ; Turnis sin de
Esperanto!

'17 Li konvertis sin al Ido, ;
Kiu estas pli scienca, ; Ĉar...
"neniu koincido ; Faras vorton
dubosenca!!")

& La kripla Pegazo:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 598 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis K. Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per modifo de sveda popolmelodio el Retviko (Rättvik) kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/do MiFa ReFa Mi DoMi SoSo; So doTi redo do LaFa SoSo;

(#Rekantaĵe: So doTi dore do; LaFa SoFa MiFa SoFa ReTI Do o)

)×26)+

(&Strofoj:

'1 Porko malsata sonĝas pri glano, ; Dolĉajn bombonojn sonĝas infano.

(×: **Li revas pri sukces' ; En la granda mondo regas la forges'.**)

'2 Esperantisto sonĝas pri rimoj. ; Ve, de la sonĝo venas la krimoj.

'3 Krimoj de rimoj, verŝoj de versoj, ; Sur la Parnaso grandaj renversoj.

'4 Fulmas la kapo hirte, senkombe, ; Ĉiu poeto turnas sin tombe.

'5 Kun la Vortaro Sankta de Rimoj ; Li al ĉielaj altmalproksimoj

'6 Rajdas fiere sur la Pegazo. ; Lin bela Muzo gvidas — ĉe nazo.

'7 Svarmas en versoj novaj belecoj, ; Granda amaso el ĉiuj specoj:

'8 Li al la frazoj kolon eltordas, ; Kaj la finaĵojn simple demordas.

'9 Pri la printempo, vintro kaj vento, ; Sepdeksesfoje pri l' Nova Sento,

'10 Pri Ŝi, la Kara, kiun li amas, ; Versoj trumpetas, marŝas — kaj lamas.

'11 Ĉion li movas, ĉion li provas, ; Gloron eternan li por si kovas.

'12 Rompas la ovon, rampas la
ido ; El la ovŝelo — estas ĝi:
rido.

'13 Ĉar ja la homoj, granda
bedaŭro, ; Metas foliojn
sanktajn de laŭro,

'14 Ve, ne sur lian kapon
glornoman, ; Prefere — en la
supon terpoman.

'15 Oni, senhonte, jen, eĉ
kritikas! ; Hoko de moko akre
lin pikas,

'16 Diras kritiko, la
serpentsibla, ; Lian Pegazon
fajra — sed kripla.

'17 Kaj liajn rimojn diras ĝi
surdaj, ; Kaj la ariojn diras ĝi
gurdaĵ,

'18 Kaj lian voĉon diras ĝi
raŭka, ; Kaj la poeton diras
sentaŭga.

'19 Jes, je l' adreso de la poeto
; Venas sciigo en la gazeto:
.....

'20 "Viaj versaĵoj — havu
kuraĝon — ; Estas tre taŭgaj
— kovri fromaĝon.

'21 Sed post ĉi tiu akra atenco
; Ĉesas jam en li la pacienco
.....

'22 Kaj li eksplodas, kiel per
briko ; Forte batita gala
veziko:

'23 Kiel ekzistus verso ja
bona, ; En Esperanto, la
malbonsona,

'24 Tio ja estis tute malsprita: ;
Versi en lingvo fuŝefarita.

'25 Kaj li riproĉas, plendas kaj
ĝemas, ; Krias, insultas,
muĝas, blasfemas,

'26 Hurlas, malbenas, tondras
sen brido, ; Kaj furioze — iras
al Ido.)